**LAJOS KASSÁK**

*Notojn vidu sur pĝ. 172.*

## FRAGMENTO EL LA ROMANO: »VIVO DE HOMO.«



zurok, post la kruela kazo, ke la draŝmaŝino dismordis unu lian brakon, du monatojn ne venis en la laborejon. Sed mi ofte lin renkontis, li estis ege faksperta pri la kolomboj kaj ni tute interkamaradiĝis. Ĉiuvespere, se nur li povis, se lia patro ne estis hejme (lia patro estis fanfaronema poŝtisto) li atendis min ĉe stratangulo, kune ni iris hejmen al ni, kaj la tutan vesperon ni restis ĉe la kolomboj. Li havis ĉiam ian planon, ĉiam li cerbumadis pri io, kaj foje li elcerbumis, kiamaniere oni povas fari novspecajn kolombojn.

— Idon, kiam ĝi komencas plumiĝi, ni ĉirkaŭplektos per kanabfadeneto, aparte ĉe ĉiu plumtigo, kaj, vi vidos, ni faros kolombon, kun tiel krispa plumo, kian ankoraŭ neniu havas.

— Stultaĵo — mi diris — kiel povus esti krispa la plumo, kiu naskiĝis rekta!

— Tio estas malplena rezonado! Ĉu vi konas la junan virinon, kiu loĝas apud nia pordo?

— Jes!

— Kaj kian hararon ŝi havas?

— Krispan.

— Certe, krispan. Sed vi estas tre stulta, se vi kredas, ke ŝiaj haroj naskiĝis krispaj. Tiaj ili estis, kia la najlo, sed foje mi vidis, ke ŝi traplektis ilin per ŝnuro kaj de tiam ŝi havas

kapon, kian la ŝafo. Se tiam ŝi estus ilin enplektinta, kiam ili komencis kreski, nun ili estus eĉ pli belaj.

— Bone, — mi diris — ni provos. Sed kio okazos, se ĝi mortos?

— Se mi havus idon, mi estus jam enplektinta ĝin!

Kaj iun vesperon ni eklaboris. Ni forprenis unu idon de la blankaj kropfkolomboj, mi metis ĝin inter miajn genuojn kaj ni ambaŭ komencis sur ĝi labori. Ni nodigis la fadenon ĉe la radiko de la laktaj, molaj plumoj, ni volvis la tuton en etan bulon, kaj ligis ĝin.

La birdo senĉese kvikis. Sur miaj genuoj mi sentis, ke ĝia interno rapide, time frapadas.

— Ni ĉesigu — mi diris. — Stultaĵo!

Szurok eĉ aŭdi ne volis pri tio.

— Ne faru tiel malsaĝan mienon. Ni aranĝos ĝin dum du vesperoj kaj ni havos la unuan krispan kolombon.

Poste ni sidiĝis kun ĝi sub la strata petrollanterno kaj ankaŭ tie ni laboris sur ĝi. Jam estis malfrua nokto, kiam ni remetis ĝin en la neston.

La kompatinda besteto aspektis plorinde kaj senespere. Pri la unua duono ni jam estis pretaj, la blankaj plumtufetoj kuŝis sur la duone kalva korpo, kvazaŭ sensukaj, sekŝrumpaj beroj.

— Morgaŭ ni enplektos la alian flankon, sed estus plej bone, se vi morgaŭ tute ne irus en la laborejon. Ni portos ĝin al la akvo kaj tie ni faros ĝin preta.

— Ne! Vagabondi, tion mi ne volas. La afero ne forkuros ĝisvespere.

Mi havis maltrankvilan, malbonan nokton. Neniel povis al mi enkapiĝi, ke ni vere sukcesos krispigi la kolombon. Certe tia ideo neniam povus al mi veni en la kapon. Ja kiel kreskos de nun la plumo, kiu estas tiel ŝrumpigita, ligita, ke ĝi eĉ ne povas moviĝi. Mi bedaŭris, ke mi konsentis pri tiu ĉi tuta malbela laboro. Mi deziris ellitiĝi kaj liberigi la nodojn, sed mi jam estis ege laca kaj lacege mi lasis la tutan aferon por la mateno. — Sed tiam mi certe faros, mi ne povas elteni, ke mi tiel turmentu sendefendan beston.

Malgraŭ la instigoj de mia patrino, mi povis vekiĝi nur ege malfacile.

— Kio estas, ke tiel malfacile vi retrovas vin. Ĉu vi estas malsana?

— Nenio al mi, — mi diris. — Mi ne estas malsana... Diru, patrineto, ĉu vere la virinoj kutimas plekti ŝnureton en la harojn kaj per tio ili krispiĝas?

— Ekzistas tiaj idiotoj! — respondis mire la patrino. — Sed kiel tio venas nun en vian kapon?

Mi jam ne aŭskultis ŝin. Duonnude mi kuris al la porkejo... Do, tamen vere... La valoro de Szurok ege ekkreskis al mi en tiuj ĉi momentoj.

La aĉigita kolombo sidis tie en la nesto, sola. Gia parulo forrampis tute en la alian flankon de la kesto. Mi vidis, kvazaŭ ĝi ŝtelrigardis la alian per suspektemaj okuloj. Tio ĉi sidis displatiĝinte kaj nur kviketis kun kapo altenlevita. Mole mi ĝin ektuŝis, ĝi eĉ ne rimarkis.

Mia patrino kriis al mi.

Mi remetis ankaŭ la alian idon en la neston kaj mi foriris por labori.

Mi ne komprenis, kio estas al mi la tutan tagon. Kvazaŭ io malbona okazis en mia kapo, mi forgesis ĉion, la objektoj kvazaŭ ne lasis min proksimiĝi al ili, kaj la uzinlernantoj forlogis de mi mian cigaredon, sen ke mi estus eĉ provinta min defendi kontraŭ ili.

Posttagmeze oni irigis min en la fervendejon, kaj mi ne havis forton min reteni: mi hejmenkuregis por rigardi la krispiĝantan kolombon.

Tio estis la unua fojo, kiam mi deviis de l' rekta vojo, dum miaj lernantaj jaroj.

La ceteraj, kiam mi revenis, mallaŭdis min kaj mi denove komencis la brutan laboron de la borado. Mi estis nek ĉi tie, nek tie. Mi sentis la rompiĝon de mia korpo kaj el ia nigra nebulo fluis la malĝojo en min. Oni ofte sentas, ke oni kvazaŭ perdiĝis en la mondo. Certe la aferoj doloris de ie elinterne. Eble la sorto de patrino vivanta inter siaj malsanaj infanoj estas tiel senkolora kaj saturita de foruzita aero. Kaj se iu estus demandita, kio al mi estas, mi ne estus povinta respondi.

— Ne insultu min — mi diris al la lernantoj. — Kial vi ĝojas, se alia homo suferas apud vi? Ankaŭ mi estas nek pli malbona, nek pli stulta ol vi, tamen mi estas ĉiam la propeka kapro.

— Ne klakigu vian buŝon! Se vi volas prediki, kial vi ne iĝis episkopo?

Mi turnadis plu la radon. Mi estis nedireble laca, la aero malfacile eniĝis al mi, mia buŝo estis malfermita kaj la ŝvito fluis en ĝin de mia frunto.

Revenis la memoroj de mia plej juna infanaĝo. Mia avino tiam estis sana kaj ĉiuvespere li kutimis horlonge laŭtlegi al ni el ĉifonaj, rozkoloraj kajeroj. Bele, laŭtakte ŝi diradis la vortojn kaj la kampo lumis antaŭ ŝi, kvazaŭ brilanta dornrozujo.

Ŝi legis pri piratoj, banditoj, mutaj grafoj kaj siberiaj plumbminejoj, kien la granda rusa caro ekzilis la malplaĉajn al li subulojn, kaj kie aŭ la plumbo formanĝis, pecon post peco, tiujn ĉi homojn, aŭ, kvazaŭ ili estus naskitaj por tio, ili morte kadukiĝis en la terura laboro.

Ege ni atendis la vesperojn, por ke ni povu reaŭskulti tiujn ĉi senfinajn rakontojn. Ekstere estis tiam vintro, interne fajro brulis en la forno kaj ni, sidante ĉirkaŭ la tablo, sinforgese sorbis la sencon de l' vortoj. Mi sidis kontraŭe al la avino kaj eĉ por momento mi ne forprenis mian rigardon de ŝiaj brilaj dratkadraj okulvitroj. Mia patrino sidis flanke, inter ni, kun la du knabinoj. Se ili laciĝis, ŝi prenis ilin en la sinon kaj tie ili silente endormiĝis.

Ni restis tri ĉiuvespere, ni aŭskultis kaj atentis tiel, ke nia haŭto preskaŭ krevetis de interna soifo kaj iom post iom mi komencis plori.

La kompatindaj sklavoj de la caro, pri kiuj avino legis, aperis antaŭ ni en sia tuta ekzisto, ni sentis ilian homan doloron kaj ni konis la senfundajn minejojn, kie ili elfosis la karbon per siaj dek ungoj kaj la senfinajn neĝkampojn, tra kiuj ili provis fuĝi de siaj turmentantoj.

Avino neniam ploris. Ŝi nur legis sente, kun patrina varmo, ŝiaj okulvitroj brilis kaj ŝi estis super ni granda, vastiĝinta, kvazaŭ fruktarbo.

Kaj antaŭ la enlitiĝo nur ŝi kuraĝis ŝlosi la pordon.

Mi dormis kun mia pli granda fratino, mi tute alpremis min kaj longtempe mi ne kuraĝis fermi la okulojn.

La lampo lumis tra la tuta nokto sur la tablo.

Tiuj ĉi malgajaj homoj de tiam ofte aperis al mi, por ke ili trastumbladu mian vivon, kvazaŭ devojiĝintaj ombro. Kaj nun mi sentis mian plenan unuiĝon kun ili.

Mi turnis la maŝinon, kvazaŭ alia malbona, ĝismorte pelata maŝino, kaj mi estis ege malproksima de ĉio, kio estas varma, bela, kaj amplena en la vivo.

Ŝola punkto estis, al kiu mi sopiris. Mi volis vidi la kolombon, mi sentis, ke mi estas kulpa kontraŭ ĝi. Mi atendis la vesperon kaj la horoj pantoflis per pezaj plumbo-piedoj.

Szurok senkomprene alrigardis min, kiam mi diris al li:

— Mi hontas, ke mi estas tiel nehoma. Eble ĝi jam mortis.

— Kreteno vi estas! — li kriis kaj furioze li paŝadis post mi. — Vi estas plorema kato, kvazaŭ ia fraŭlina moŝto.

Hejme li triumfe fingropikis min:

— Nu, rigardu, stultulo! Mi ja diris, nenio malbona al ĝi!

La duone enplektita besteto sidis denove sola en la nesto kaj ankoraŭ nun ĝi kviketis. Ĝi tute enpremis sin en la neston, kvazaŭ ĝi estus disŝmirita en ĝi. En ĝia kropo eĉ unu semo ne troviĝis.

— Ili ne manĝigas ĝin!

Szurok ridaĉis.

— Mi ĝin plenŝtopos, ne ploraĉu. Kiel status la mondo, se ĉiu estus tiel molaĉa, kiel vi!

Mi ne batalis plu. Mi sentis, ke sole ni estos la kaŭzo, se la kolombo mortos, sed vane mi estus dirinta tion. Kaj se tamen, eble?! Iel ankaŭ en mi vivis la kredo, ke ni sukcesos.

Post vespermanĝo ni eklaboris. Szurok unue ŝtopis la kolombon pufa per maizo, poste li komencis fari la nodojn kaj nun sur la mola korpo jam tute dense sidis apude la malpurigitaj plumnodoj.

— Vi ja vidos, kia ĝi estos! — li diris fiere. — Post unu semajno ni provos solvi la nodojn, ĝi estos kiel bela judknabino.

Mi kredis malmulte el tiuj ĉi belaj promesoj, tamen nun

mi ne vidis tiel nekredebla la tutan aferon kiel tiam, kiam mi pripensis ĝin en la laborejo. Kiam ni estis pretaj, la tuto pli similis erinacon, ol kolombon. Mi remetis ĝin en la neston, tre milde, zorgeme. La forrifuĝintan alian kolombon mi sidigis apud ĝin.

Kio okazos, mi ne sciis, sed sekrete mi esperis ion bonan kaj tiel mi kuŝiĝis inter duboj kaj esperoj ĝis morgaŭ.

Matene, mia unua afero estis kuri al la bestejo.

Terurite mi retroiĝis.

La kompatinda, nodita kolombo estis elĵetita el la kolombejo. La maljunuloj elĵetis ĝin, kiel ne plu la sian. La hirta korpo, kvazaŭ malbela, flava pantoflo, kuŝis surtere.

Mi ne kapablis ĝin tuŝi, kaj reiris senpove, dorskline en la loĝejon.

— Kio estas al vi, knabo? — demandis la ektiminta patrino. — Kio okazis al vi?

— Mi estas malsana — mi diris — sciigu la majstron, ke mi estas malsana.

La tutan tagon mi pasigis en la loĝejo.

Mi ne sciis, kio propre estas al mi? Mi jam vidis bluiĝintajn elakvigitajn mortintojn, mi vidis sangantan korpon, kia estis tiu de Szurok, sed ĝis nun nenio efikis min tiel aflikte.

Eble, ĉar ĉion ĉi mi mem kaŭzis!

Mi multe meditis tiun tagon kaj iom post iom mi sentis, ke Szurok volis mortigi pro envio miajn kolombidojn kaj tial li elcerbumis la tutan komedion, por ke li pereigu ilin.

Mi jam vidis multon malbelan en la karaktero de la homoj, mi ne amis ilin kaj tiu ĉi tago min puŝis de ili eĉ pli malproksimen.

*(Szilágyi.)*